

Eŭropa Bulteno

Junio 2016, Numero 161

BRITELIRO KAJ ESPERANTO



De la tempo de EEU-kongreso en Rijeka mi havis bonajn, amikajn kontaktojn kun la eksa ministrino de Kroatio pri ekologio kaj prezidantino de verda partio ORAH Mirela Holy kaj nun post Briteliro mi klarigis al ŝi kiaj estas miaj strapunktoj pri la eŭropa situacio kun la eventuala rolo de Esperanto en estonta Eŭropo. Jen mia letero al ŝi:
 »Eŭropa Esperanto Unio (EEU), en kiu mi estas sekretario, traktas la temon de fortigo la Eŭropa Unio, ĉar ni konsideras ĝin kiel tre

gravan faktoron cele al konservo de la eŭropa kaj monda paco. Hodiaŭ, post Briteliro, ni sentas pli forte ol antaŭe, ke la plej grava tasko de EU devus esti EDUKADO de ĉiuj civitanoj, precipe gejunuloj, kiu entenus eŭropajn valorojn cele al evoluigo de eŭropa konscio kaj aparteno al EU kiel dua hejmo de ĉiu. Ĉar sen kredo ĉe la plimulto ke oni estas eŭropanoj estos en la estonto neevitebla disfalo de EU.

Se eŭropanoj ne perceptas EU-on kiel sian duan patrujon, apud la nacia patrujo kaj ne havas senton de aparteno al ĝi, tiam ili en ajna kriza situacio decidus kiel la britoj - favore al naci-egoismaj interesoj.

La formado de eŭropa konscio devus inkluzivi:

1. Lerni kaj kompeni eŭropajn valorojn (kiuj miaopinie estas unikaj kaj estas listigitaj en nia paĝaro www.wix.com/dtisljar/euro)
2. Interkonatiĝi kun la plej gravaj karakterizaĵoj de ĉiuj 27 membro-ŝtatoj, precipe pri tiuj kiuj kontribuis al la eŭropa integriĝo kaj tutmonda progreso
3. Lerni pri EU simboloj kiuj elvokas emocian rilaton kaj devas esti nur eŭropaj (neapartenantaj al iu ajn unuopa popolo, do neŭtralaj) kiel EU-flago, himno (kiu devus ricevi la vortojn), la nomo de la mono (kiu estas ne marko, nek franko ...), kaj plej grava el ĉiuj simboloj, la lingvo. EU ne povas postvivi longtempe, se ĝi ne elektos komunan eŭropan lingvon, kiu nepre same devas esti neŭtrala. Ni havis multajn ekzemplojn, kiam landoj konsistantaj el pluraj diverspopolaj regionoj provis evoluigi komunan identecon bazitan sur la lingvo de la plej granda popolo (rusa en Sovetunio, serbokroata en Jugoslavio, ktp).

Kompreneble tiusence ni pensas pri Esperanto, sed ĝi certe ne estas la nura kandidato (povus esti aŭ la latina aŭ ne-eŭropa lingvo).«

Ŝi respondis jene:

»Kara Zlatko,

ĉio kion vi skribis estas tre proksima al mia pensmaniero kaj mi povas tion nur subteni. En politiko, mi estas konvinkita, ke homoj ne devus esti taksataj laŭ ilia propra pensmaniero ĉar tiamaniere oni povas fari grandajn erarojn. Tio estas idealisma koncepto de ideale komprenitaj homoj. Sed la plej multaj homoj, bedaŭrinde, ne estas tiaj. Sekve, mi kredas ke edukado estas la plej grava afero ĉar nur per edukado oni povas atingi sufiĉan kritikan mason da personoj kiuj povos ŝanĝi la staton sur la propraj dorsoj.

En ajna kazo, mi deziras al vi multan sukceson!«

Mi do komprenas ŝian respondon tiel, ke bedaŭrinde bonaj ideoj ne penetras politikon, se malantaŭ ili ne troviĝas grandaj konvinkitaj amasoj kiuj premas la publikan opinion. La saman vidpunkton siatempe esprimis la aŭstria ŝtatestro Jonas kaj la jugoslavia Tito. El tio ni konkludu ke politikistoj akceptos iun gravan novaĵon se ĝin subtenas kaj postulas milionoj da homoj kaj ne iuj komitatoj aŭ unuopuloj.

Sed ankaŭ ŝi plene konsentas pri tio, ke la starpunktojn de la amasoj oni povas ŝanĝi nur per edukado. Pro tio en la nuna situacio de Briteliro, kiu laŭ mi estas momento kiam malfermiĝas ioma niĉo por fari pli ol ni povis ĝis nun, ni

1. klopodu plene subteni similajn projektojn kiel duolingo per kiuj ni povas prui ke malantaŭ Esperanto troviĝas ne kelkmilo da homoj sed milionoj
2. ni klopodu konvinki la decidantojn (tiujn parlamentanojn de Europa parlamento kaj Komisionanojn, kiujn ni persone povas aliri) ke oni faru ion por leĝigi poreŭropisman edukon kadre de kiu unu el la eroj estus eksperimenta baza instruado de Europa lingvo (eĉ ne deviga), ĉar verŝajne en nuna situacio ankaŭ plimulto de la parlamentanoj povas kompreni kaj akcepti la neprecon eduki eŭropojn por komuna identeco.

Zlatko Tišljarić

LA ANGLA NE ESTOS OFICIALA EU-LINGVO POST BRITELIRO



Neniu alia EU-lando havas la anglan kiel sian oficialan lingvon, kaj do ĝi povus perdi sian statuson.
Hortense Goulard
6/27/16, CET

Danuta Hübner, estro de la Komitato pri Konstituciaj Aferoj de la Eŭropa Parlamento (AFCO), avertis lundon ke la angla ne estos unu el la oficialaj lingvoj de la

Eŭropa Unio post kiam Britio eliros el EU. La angla estas unu el la 24 oficialaj lingvoj de EU ĉar Britio identigis ĝin kiel sian propran oficialan lingvon, diris Hübner. sed tuj kiam Britio kompletigos la procedon eliri el EU, la angla povus perdi sian statuson.

"Ni havas reglamenton ... laŭ kiu ĉiu EU-lando havas la rajton avizi pri unu oficiala lingvo",

diris Hübner. "La irlandanoj avizis pri la gaela, kaj la maltanoj avizis pri la malta, do vi havas nur Brition kiu avizis pri la angla. Se ni ne havos Brition, ni ankaŭ ne havos la anglan". La angla estas unu el la laborlingvoj en la eŭropaj institucioj, diris Hübner, aldonante: "Ĝi efektive estas la domina lingvo", tiu plej ofte uzata de ŝtatservistoj de EU. La reglamenton kiu listigas oficialajn lingvojn de EU oni devus unuanime ŝanĝi fare de la restantaj landoj se ili dezirus konservi la anglan kiel oficialan lingvon, diris Hübner.

Tamen fonto de EU klarigis, ke la reglamentoj kiuj regas la oficialajn lingvojn mem estas diversmaniere interpreteblaj. La reglamanto de 1958 rilate al la oficialaj lingvoj de EU, kiu origine estis verkita en la franca, ne klare diras, ĉu membro-lando – Irlando aŭ Malto ekzemple – povas havi pli ol unu oficialan lingvon, diris fonto de EU. Interpretoj de la franca vortumo emas konkludi, ke tio povus eble, dum la angla versio ŝajne eliminis tiun eblecon.

Tradukis Ian Fantom

INSTRUADO PER DUOLINGO EN SLOVENIO

Mi estas instruisto kaj ekde septembro mi donas kurson pri Esperanto en mia bazlernejo en Koper (Slovenujo). Mi instruas Esperanton al dudek lernantoj, kiuj estas dek unu jarojn aĝaj, per tabulkomputilo uzante la programon „Duolingo”. Jen la retpaĝo de Duolingo:

<https://www.duolingo.com/>



Mi instruas Esperanton ĉiusemajne unu horon kaj ĉiun semajnon mi havas pli da lernantoj. La lernantoj estas tre motivitaj, ĉar ili uzas tabuletojn kaj konkurencas unu kun la alia. Duolingo ebligas, ke la lernantoj iĝu amikoj inter si kaj la lernantoj povas vidi, kiom da poentoj gajnas iliaj amikoj. Ankaŭ mi faris konkuradon por la lernantoj kaj la ses plej diligentaj lernantoj ricevos libron de fabeloj en Esperanto. La donanto estas la Slovena Esperanto-Ligo.

Kiaj estas la profitoj lerni Esperanton uzante la anglan lingvon? (oni povas lerni E-on ĉe Duolingo nur uzante la anglan) La gepatra lingvo de la plejmulto de la lernantoj estas la slovena lingvo. La lernantoj uzante la programon „Duolingo” devas pensi en tri malsimilaj lingvoj samtempe kaj pro tio ilia cerbo devas ekfunkcii rapidege... La lernantoj nun komprenas pli bone la anglan ol antaŭe. La lernantoj eklernis la anglan lingvon sepjaraĝaj, sed la plejmulto de la lernantoj lernas ĝin parkere, ne komprenante bone, kiel la angla lingvo funkcias. Uzante la vojon Duolingo, mi asertas, ke uzante Esperanton kiel regulan lingvon, ili pli bone komprenas, kiel funkcias la angla lingvo kaj samtempe ili lernas Esperanton. La lernantoj lernas tute solaj. Ili devas solaj kompreni la regulojn. Mi helpas al ili nur, se ili petas min. Do cerboj funkcias tre rapide... Laŭdinda afero estas ankaŭ, ke la studentoj venas dek ĝis kvindek minutojn antaŭ la komenco de la kurso, helpas min prepari ĉion, kaj komencas lerni solaj antaŭ la komenco de la kurso, kaj kiam la kurso finiĝas, ili ne volas iri

hejmen. Mi aŭdis ilin priparoli irante hejmen: „Pluvas, mi ludos Esperanton per mia tablojdo hejme unu horon”. Rimarkinde estas, ke la lernantoj ludas uzante Duolingo por lerni Esperanton. Duolingo ebligas al mi kiel instruisto, ke mi povas vidi, kiom ili lernis hejme. Surpriza afero estas, ke pli ol duono de la lernantoj lernas Esperanton sola hejme laŭ sia propra volo. Do ili pensas, ke ili ne lernas malinteresan fremdan lingvon, sed ke ili ludas per nova ludilo.

Ili ludante lernas. Kia bela afero!

Peter Grbec

Republikigo permesita de Internacia Pedagogia Revuo (2015/04)

PAŜOJ AL PLI EGALCEMA EŬROPO

Ni troviĝas antaŭ historia momento. La Briteliro forte skuis nian komunan Eŭropan ŝipon. En la venontaj jaroj ĝi prezentos grandajn defiojn. Tiuj ĉi defioj aldoniĝos al profundaj strukturaj problemoj kiujn travivas Eŭropa Unio jam de antaŭ kelkaj jaroj. En la horizonto emerĝas du ĉefaj malamikoj: malegaleco kaj socia dekadenco.



Sed ne miskomprenu nin. Nia kruda prezento de la realo kaj la estonteco kiu desegniĝas antaŭ ni tute ne fontas el pesimista sinteno. Tute male, ĝi fontas el la deziro klare identigi kaj esplori la problemojn por trovi kaj proponi plej efikajn solvojn.

Plie neniam antaŭe en la Historio de la homaro la tehnikaj kapabloj estis tiom potencaj kaj alireblaj al la plejmulto el la homoj kiom hodiaŭ. La maksimuma disvolvo de la interreto ekde la naŭdekaj jaroj profunde ŝanĝis la manieron interrilati, kundividi kaj labori. Kreiĝis riĉeco en socie kaj geografie periferiaj lokoj helpe de milionoj da malgrandaj produktantoj kiuj, la unuan fojon, povis efektive aliri aliajn merkatojn kaj sciojn.

Ni kun granda memfido alrigardas la defiojn kaj ni firme kredas je la ebleco starigi ĉi tie kaj nun la bazojn por batali malegalecon kaj socian dekadencan kaj teksti ĉi tie kaj nun la necesajn retojn por krei abundon kaj bonstaton en ĉiu Eŭropa angulo, ne gravas kiom periferia ĝi estas. Sed tute ne eblos kune alfronti kaj konstrui pli egaleceman Eŭropon se ni ne kundividus kaj partoprenas komunan Eŭropan Konversacion. Tiu ĉi estas la unua nepra paŝo al pli egalecema

Eŭropo. Tiu ĉi unua paŝo estas neniel bagatela. Datumoj pri lingva demokratio en Eŭropo konkludas ke la uzo de la angla lingvo kiel lingua franca rekte ekskludas 49% de la eŭropa loĝantaro.

Ni lanĉas la projekton «Eŭropano». Malsame ol oficialaj retejoj de Eŭropa Unio kiuj elspezas milionojn da eŭroj kaj bezonas centojn da tradukistoj por fari siajn publikaĵojn alireblaj en dekduo da lingvoj, Eŭropano metos en praktikon kaj testos la utilon de Esperanto kiel duan helpan lingvon por ĉiuj eŭropanoj. Eŭropano sekvos la Eŭropajn okazintaĵojn, publikigos plej interesajn novaĵojn, analizos argumentojn, redaktos kulturajn raportojn. Eŭropano estos unika fonto kaj ilo por kompreni sociajn fenomenojn okazantajn aŭ okazontajn kadre de la Unio. Eŭropano celas nutri Eŭropan komunan konversacion disvolviĝantan en nia kara helpa kaj neŭtrala Esperanto. Tiu ĉi eŭropa konversacio helpos forĝi eŭropan identecon kaj permesos en la estonteco kune alfronti kaj pridiskuti sekvajn paŝojn en la konstruo de pli egalecema Eŭropo.

En la pado, kiun ni devas trairi por la plenumo de tiu ĉi projekto, ni certe troviĝos kaj devos alfronti multajn malfacilaĵojn. Ni alfrontas malfacilan kaj longan militon kontraŭ malegaleco kaj diskriminacio. Sed nia devo kaj respondeco estas kuraĝe alfronti ilin. Ni faru la unuan paŝon al pli egalecema Eŭropo. Ne maltrafu la okazon havi aktivan partoprenon en tiu ĉi historia momento. Ni bezonas vian helpon! Enŝipiĝu!

Manuel Ortega

Kunordiganto de la projekto

Membro de la grupo de kooperativoj «las Indias»

INTERVJUO KUN RAYMOND GERARD (REMUSH)

Zlatko Tišljarić: Neniu ĝis nun en la mondo laŭ mia scio kreis programon kiu aŭtomate dismetus vortojn je morfemoj por povi nombri oftecuzon de morfemoj en unuopa lingvo. Ankaŭ ne por Esperanto, ĉar tio unuavide ŝajnas neebla. Por la legantoj mi klarigu ke en Esperanto samkiel en ĉiuj lingvoj ekzistas multaj vortoj kiuj mem povas esti morfemoj kaj ankaŭ konsisti el pluraj pli etaj morfemoj. Ekz. „kombino“ estas vorto kiu konsistas el morfemoj KOMBIN kaj O, sed IN estas ankaŭ sufikso kaj povus temi pri vorto el tri morfemoj KOMB, IN kaj O, la vorto PIRAMIDO konsistas el du morfemoj PIRAMID kaj O, sed en tiu vorto enestas teorie 4 morfemoj PIR, AM, ID kaj O. Tiaj ekzemploj estas tre amasaj. La komputilo ne komprenas la tekstojn kaj ĝi ne povas scii kiam iu morfemo estas parto de vorto kaj kiam ne. Kiel vi ekhavis la ideon ke tiu problemo estas tamen solvebla komputile?

La nombrado de vortoj kaj statistikoj pri vortofteco tute ne estas uzeblaj por scii kiuj vortoj estas la plej multe uzataj kaj necesaj en la lingva uzo por povi scii el kiu lingva materialo oni produkti bazajn lernolibrojn por lerni iun lingvon. Tio tre gravas por ne konfuzi komencanton kun nebezonataj gramatikaĵoj kaj vortoj en liaj komencaj praktikaj bezonoj. Ĉu vi konsciiis ke tiu ebleco science ekzakte ekscii baze de nombrado de grandegaj tekstokorpusoj (ekzemple plurdekoj da libroj) estus treege grava por aŭtoroj de E-lernolibroj kaj esenca pliefikigo de la plej eble rapida akiro de la lingvokapablo?

Ĉu vi povas klarigi kion kapablas fari kombino de programoj kiujn vi uzas tiucele? Kion vi

efektive faris por ke tiu dismembriĝo de vortoj je morfemoj okazu laŭeble senerare?
Kiom da eraroj statistike tamen restas post la apliko de viaj programoj?

Raymond Gerard: La problemo ne estas solvebla per simpla algoritmo komputila. Sed komputilo povas heŭristike elekti bonan solvon. Amaso da Esperantaj vortoj estas malkunmetebaj diversmaniere en radikojn. La plimulto de tiuj malkunmetaĵoj ne havas signifon aŭ nur povus havi signifon en tre strangaj ĉirkaŭtekstoj. Ekzemple *vortofino* povas esti diserigita en *vor'tof'in'o*, sed tiu diserigo estas tiel stranga ke nur komputilo kapablas vidi ĝin. Tamen vortoj kiel *sentema* (*sen/sent*) estas ambiguaj ekster ĉirkaŭteksto. Kiam la programo devas decidi kiun diserigon elekti, ĝi elektas tiun kiu havas la plej longan radikon. Se ekzistas du samlongaj radikoj, la programo elektas tiun kiu staras supre en la (provizora) ofteclisto de radikoj. La programo tamen devas konsideri plurajn esceptojn. Ekzemple, ...'ag'anto 'eg'anto 'ig'anto estas ofte erare diserigitaj kiel 'a'ganto 'e'ganto 'i'ganto. Vidu kelkajn [vortludojn](#).

La kontrolado de la ĝusteco de la diserigoj postulis multe da tempo. Mi kontrolis 81650 kunmetaĵojn kiuj troviĝas en la [splititaĵoj](#)-dokumento, sed eble kelkaj misdiserigoj eskapis de mi. La programo unue serĉas en tiu dokumento ĉu la kunmetaĵo jam aperis en teksto de la korpuso. Se jes, ĝi elektas tiun diserigon. Se ne, kaj se ekzistas nur unu ebla diserigo, ĝi prezentas ĝin por akcepto (pluraj tajperaroj produktas validajn diserigojn). Se pluraj eblecoj ekzistas, ĝi prezentas la plej probablan. Ju pli da tekstoj estas pritraktitaj, des pli da novaj validaj diserigoj estas aldonitaj en la [splititaĵoj](#)-dokumento.

Se tekstoj estus seneraraj, la tasko estus facila. Sed la elektronikaj dokumentoj ofte entenas tajperarojn. Tiuj eraroj estas kaŭzitaj de la proceso de kreado de tiuj tekstoj, kaj malfacilas al homaj okuloj vidi ilin. Nia cerbo kutimas aŭtomate korekti tiajn erarojn kaj elekti la plej probablan signifon de kunmetaĵo. Krome, tekstoj foje entenas intencajn erarojn. Vidu ekzemple [La Brava Soldato Ŝvejk](#).

Vi povas trovi en [diserigitaj tekstojn](#) plurajn tekstojn, kiuj estis pritraktitaj. Tio permesas al komencantoj kompreni malfacilan vorton kaj retrovi vorton en vortaro. Tio krome permesas facile kontroli la efikecon de la programo.

En la romano [Patroj kaj filoj](#) de Ivan Turgenjev (256 paĝoj); la programo trovis 262 novajn vortojn, kiujn ĝi konsideris eblaj Esperantaj vortoj. Multaj el tiuj 262 vortoj estis aŭ propraj nomoj, aŭ fremdaj vortoj, aŭ neologismoj, aŭ tajperaroj. Nur 3 vortoj estis de la komputilo malbone malkunmetitaj. Krome 448 vortoj ne estis rekonitaj kiel Esperantaj, sed inter tiuj estas ankaŭ tajperaroj. Resume, en romano de 250 paĝoj, mi devas kontroli ĉirkaŭ 700 vortojn. Se teksto havus nek fremdajn vortojn, nek tajperarojn, nek proprajn nomojn, nek neologismojn, mi devus kontroli malpli ol unu vorton en paĝo, kaj korekti unu vorton en okdeko da paĝoj.

La 15-A NOVJARA RENKONTIĜO

Ĝi okazos ĉi-jare de la 27-a de decembro 2016 ĝis 3-a de januaro 2017, en Saarbrücken, samtempe kaj samloke kun la 8-a NIS, la programo por junuloj. Novjara Renkontiĝo (NR) denove estos tuj apud Francio, kion certe bonvenigos aparte la francoj. Ja fakte Saarbrücken estas landlima urbo... Ankaŭ suda Germanio kaj Svislando denove pli proksimas. Ni do

esperas, ke multaj el vi eluzos la fakton, ke ekzemple la trajna distanco inter Parizo kaj Saarbrücken estas malpli ol du horoj.

Jen la [informa paĝo](#) kun [aliĝilo](#). Kiel kutime, ĝi abundas je Internacia etoso, prelegoj, kursoj, koncertoj, ekskursoj... Sekve, multaj kaŭzoj por veni kaj reveni al NR/NIS.

Lu Wunsch-Rolshoven

INTERNACIA SIMPOZIO DENOVE EN VROCLAVO

Kadre de la kvintaga Interkultura Majrendevuo, la 5-an de majo 2016 en la Papa Teologia Fakultato en Vroclavo (Wrocław) okazis la 2a Internacia Simpozio titolita “Kiel sukcese instrui – didaktiko teorie kaj praktike”. La simpozion por neesperantista publiko kaj esperantistoj interesigantaj pri la temo iniciatis kaj organizis la Centro de Interkultura Edukado – Vroclavo ĉifoj kun la pola ILEI sekcio kunlabore kun neesperantistaj organizaĵoj Vinci Fit Art- Radość Życia, Akademia Leonarda Da Vinci - Złoty Wiek, Stowarzyszenie TuRazem. Kun granda ĝojo mi aldonas, ke la Simpozion patronis Universala Esperanto Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.



Ĉe la komenco de la simpozio estis prezentita filmo pri efika lernado de la fremda lingvo preparita de Marlon Couto Ribeiro kaj Anikó Szalay. Profesorino Ilona Koutny (Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM) prezentis la prelegon pri instruado de vortoprovizo. Maria Pokrzywnicka (Etnografia Muzeo en Toruń) transdonis utilajn informojn kiumaniere kunlaboro kun muzeo helpas al instruistoj sukcese instrui. Grażyna Szubryczyńska (Infanĝardeno

„Kangurek” en Toruń) preparolis kunlaboron de la toruna infanĝardeno „Kangurek” kun ĉina infanĝardeno Tian Mi kaj pruvis, ke infanoj de la toruna infanĝardeno belege adaptas ideojn de Esperanto. Dank’ al Halina Kuropatnicka-Salamon (Centro de Interkultura Edukado - Vroclavo) la publiko eksciis pri la rolo de individuigado dum la instruado de personoj en la tria aĝo - vidantoj kaj blinduloj. Doktorigantino pri interlingvistiko Małgorzata J. Komarnicka (Centro de Interkultura Edukado - Vroclavo) proksimigis al publiko brazilan eduksistemon. Magdalena Filcek kaj doktorino Ewa Aplaŭs (Vinci Fit Art- Radość Życia kaj Akademia Leonarda Da Vinci - Złoty Wiek) preparolis spegulan skribadon, kiel sinkronigi ambaŭ duonglobojn de la cerbo kaj la profitojn de spiradekzercoj. Doktorino Walentyna Wnuk (Pedagogia Universitato) prezentis holisman disvolviĝon de la homo. Barbara Despiney, dr hab. Université Paris 1 Panthéon-Sorbonne resumis ĉiujn prelegojn finante la simpozion. Post la sukcesa aranĝo Ewa Rapacz kune kun neesperantistoj preparis artan programon kaj komunan vespermanĝon por la organizantoj, prelegantoj kaj gastoj.

La Internacia Simpozio plenumis gravan rolon. La partoprenantoj havis eblecon redukti streson kaj streĉiĝon kaj pliiĝis senton de harmonio, paco kaj ekvilibro. La simpozio ankaŭ

montris, ke eblas interŝanĝo de sciencaj konkludoj kaj organiza kunlaboro esperantistaj kaj neesperantistaj medioj por komuna efiko, nome la altnivela, eduka aranĝo. La organizantoj ricevis petojn prelegi pri Esperanto kaj instrui la lingvon.

Ni jam invitas partopreni en la sekva, la 3a Internacia Simpozio, kiu okazos en Vroclavo la 19an de majo 2017 dum la 2a Interkultura Majrendevuo.

Małgorzata J. Komarnicka

KIAM, KIE, KIO OKAZAS? - INTERNACIA KALENDARO pri Esperanto-renkontiĝoj, kongresoj, festivaloj!

La "Internacia Kalendaro" listigas ĉiujn konatajn Esperanto-renkontiĝojn, kongresojn, festivalojn, kiuj akceptas vojaĝantajn esperantistojn kiel partoprenantojn.

- Vojaĝu al Esperanta renkontiĝo! Serĉu kaj trovu simpatian aranĝon, kun datoj, nomoj, mallonga priskribo, reteja adreso, ktp!
- Se mankas iu aranĝo, anoncu kaj registru ĝin senpage!
- Diskonigu, reklamu la Kalendaron al viaj Esperantistaj amikoj!

La Internacia Kalendaro ĉi-jare festas sian 20-an jubileon. Ĝi estis komencita en 1996 kiel memstara rubriko en la gazeto "Eventoj", kaj ekde tiam ĝi aperas seninterrompe, jam 20 jarojn. La Kalendaron funkciigas teamo de la Esperanto-Centro "Eventoj" en Budapeŝto.

Adreso de la Internacia Esperanto-Kalendaro: <http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm>

Se vi ŝatus esti kunlabora membro en nia teamo, kontaktu nin:

Szilvási László: szilvasi@eventoj.hu

Ret-Info / Lingvo-Studio, LS: <http://www.eventoj.hu>

KULTURA-INFORMA PROGRAMO de la Studenta Scienca E-Rondo de la Jagelona Universitato

Jen la ĉefaj punktoj de la programo rilata al artistoj:

- de pluraj jaroj la rondo ĉiujare organizas, kadre de granda publika aranĝo, publikan koncerton en prestiĝa koncertejo (ties prestiĝo allogas bonajn artistojn);
- artistoj de la koncerto ricevas proponon aliĝi al allogaj, okazantaj eksterlande esperantaj (aŭ rilatantaj al E-o) muzikaj projektoj, senpagaj aŭ tre malmutekostaj (la financa faktoro de ilia decido partopreni kaj tiucele eklerni E-on estas ege grava);
- E-lernado, necesa por realigi tiun celon, estas proponata al ili.

E-instrua programo de la rondo

La pasintjaran svedan aranĝon partoprenis kelkaj muzik-talentaj junulinoj (tio estis dirita en la antaŭa mesaĝo, ĉi-suba). Ili eklernis E-on ĝuste por partopreni tiun aranĝon. Ili estis instruataj de membroj de la rondo kaj studis parte solaj, entute sub didaktika gvido de la universitata instruistino, Maria Majerczak. En 2014 la rondo kunlaboris kun artistoj de la konata Kabareto Loch Camelot, artista kelo, troviĝanta en la centro de Krakovo, tuj apud la Ĉefplaco (se oni volas havi ideon pri ilia arta nivelo: <https://www.youtube.com/watch?v=vWodN0FA2b8> -

kun gastkantanta viro; <https://www.youtube.com/watch?v=X8IUd3OPH5U>,
https://www.youtube.com/watch?v=o_R7qvQegzA).

Konkludo

Utilaj estas aranĝoj, dum kiuj oni povas lerni per E-o ion konkretan kaj seriozan, precipe tion, kio kontribuas al la homa evoluo intelekta, spirita, arta, teknologia k.a. La profesiaj celoj estas speciale gravaj por la junaj homoj, kiuj - komence de la profesia vojo - konstruas sian fakan kapitalon.

Maria Majerczak

SOMERAJ ARANĜOJ EN ESPERANTO-URBO



Antaŭ la ĉi-jara UK la germana urbo Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo havas du gravaj aranĝojn. Ĝi festos la 10-jaran jubileon de Herzberg kiel Esperanto-urbo en la 9-a de julio kaj gastigos la 89-an SAT Kongreson inter la 16-a kaj 23-a de julio. La ĝemelurbaj aktivadoj estos rimarkindaj.

1. En la jubileo partoprenos oficiala delegacio el la pola ĝemelurbo Góra sub gvido de la urbestro. Inter la invititoj estas lokaj kaj regionaj politikistoj, reprezentantoj de la lernejoj, ĉeestos kaj

krom la urbestroj de la ĝemelaj urboj festparolos ankaŭ la eks-urbestro, s-ro Gerhard Walter.

2. En la SAT-kongreso (a) s-ino Zsafia Korody kaj s-ro Peter Zilvar en prezento pri rezultoj el la agadoj de la Esperanto-Centro temos pri nia ĝemelurba kunlaboro.



(b) s-ino Zsafia Korody aparte prelegos pri la junulara agado en la ĝemelaj urboj kaj ĉefe pri la tre sukcesaj Someraj Arbaraj Lernejoj (SALO).

(c) s-ino Zsafia Korody rekomendis s-ron Pieter Engwirda, respondeculo de LA en Nederlando pri ĝemelaj urboj, prezenti la agadojn por la projekto Ĝemelaj Urboj, por montri aliajn eblojn kaj celojn de internacia ĝemelurba kunagado.

Wu Guojiang

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de junio 2016

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljár, Raymond Gerard, Hortense Goulard, Peter Grbec, Manuel Ortega, Lu Wunsch-Rolshoven, Małgorzata J. Komarnicka, Eventoj, Maria Majerczak, Wu Guojiang

Kontakto: ztislar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

